

MARTA LIN GASTIGIS. MARIA ELEKTIS LA PLEJ BONAN PARTON – Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 10,38-42

En tiu tempo, dum ili vojaĝis, Jesuo eniris en unu vilaĝon kaj virino, nomata Marta, lin gastigis.

Ŝi havis fratinton, nomatan Maria, kiu, sidante apud la piedoj de la Sinjoro, aŭskultadis lian parolon. Marta, male estis distrata pro multaj servoj.

Do ŝi alproksimiĝis kaj diris: «Sinjoro, ĉu vi ne zorgas pri tio, ke mia fratino lasis al mi servi sola? Diru do al ŝi ke ŝi min helpu». Sed la Sinjoro respondis al ŝi: «Marta, Marta, vi klopodegas, vi agitiĝas pri multaj aferoj, sed nur unu afero estas bezonata. Maria elektis la plej bonan parton, kiu ne stos prenita for de ŝi».

Kiam ni legas la Evangelion ni devas eviti la riskon, kaj pasintece tio okazis, interpreti la pecojn laŭ nia okcidenta pensmaniero. Hodiaŭ ni konatiĝis kun la peco pri Marta kaj Maria, kiu estis ĉiam interpretata kiel laŭdo al Maria, la kontempla vivo, je malprofito de la malbonŝanca Marta, la aktiva vivo.

Kiel se estus do iu elito da personoj kiuj povas elekti kontemplan vivon, dum plej parto de la personoj restas ĉe la vivo de ĉiutagaj laboroj.

Absolute neniel ĉi tiel. Ni vidu la pecon, ĉapitron 10 de Luko, ekde la vers. 38. “Dum ili vojaĝis”, la irado estis al Jerusalemo, kien Jesuo iras konfrontiĝi, “li eniris en unu vilaĝon”. Ĉi tie la evangeliisto rimarkigas la kolizion: dum ili estis irantaj, Jesuo kaj siaj disĉiploj, nur li eniras en unu vilaĝon. Kial la disĉiploj estas lasitaj ekstere?

Ĉar la disĉiploj ankoraŭ havas iun pensmanieron pro kiu ili ne sukcesas kompreni la novaĵon portatan de Jesuo, la novaĵon, kiun Jesuo volas porti ĝuste en tiun vilaĝon. Kiam en la evangelioj ni trovas la vorton ‘vilaĝo’ tio estas ĉiam en negativa senco; la vilaĝo estas la loko de la tradicio, estas la loko de la pasint(ec)o, estas la loko kie la novaĵoj estas vidataj suspekteme. Do ĉiun fojon kiam ni trovas la vilaĝon temas ĉiam pri negativa medio de malamikeco aŭ nekomprenemo al la mesaĝo de Jesuo.

“Kaj jen virino nomata Marta”, la nomo Marta en la aramea lingvo havas signifon jam simblan, “sinjorino, dommastrino”, “lin gastigis” do la domo estas ŝia. “Ŝi havis fratinn, nomatan Maria, kiu sidante apud la piedoj de la Sinjoro”, jen, tiun fakton sidadi je la piedoj de la Sinjoro oni ne devas interpreti laŭ okcidenta pensmaniero kiel signon de kontemplado, de adorado.

Nenio tia; en la mezorienta domo, en la Palestina domo ne ekzistas la seĝoj, oni sidadas tere, sidadi apud ies piedoj do signifas ‘lin aŭskulti, lin akcepti’. Ekzemple estas S.kta Paŭlo kiu diras ke li estis klerigata “apud la piedoj de Gamalielo, aŭ en la Talmudo oni diras: “via hejmo estu kunvenejo por la kleruloj, vin polvigu per la polvo de iliaj piedoj kaj trinku soife iliajn vortojn”.

En ĉi tiu kazo la sinteno de Maria ne estas ador- aŭ kontemplo-plena. Ŝi akceptas Jesuon kaj aŭskultas lian instruadon. Ĝi estas la sinteno de disĉiplino al majstro. “Kaj ŝi aŭskultadis lian parolon”, la termino ‘parolo’ estas en la greka Logos kaj ĝi signifas ne nur porokazan instruadon, sed ĉiujn mesaĝojn de Jesuo.

“Marta male estis distrata pro multaj servoj”. Estas normale en la hebrea tradicio ke la virino estu izolita en la kuirejo, kaj ke la viro akceptu la gaston. La virino ne, ŝi estas nevidebla kaj plenumas multajn servojn. Maria kapablis malobservi la tabuon de la religio kaj de la moralo kaj rolas ĝuste kiel viro kaj tion Marta ne toleras.

“Do ŝi alproksimiĝis kaj diris: ‘Sinjoro, ĉu vi ne zorgas...’”, Marta do riproĉas Jesuon pro la libereco kiun la fratino prenis al si. Kaj ni rimarku ke ĉi tie por Marta ĉio certriĝas sur sin mem. “«...MIA fratino, lasis MIN sola servadi?’ Diru do al ŝi ke ŝi MIN helpu»”, temas pri ordono ne pri peto.

Mia fratino, lasu min, helpu min... ĉio centrata sur sin mem. Ŝi estas la perfekta observanto, la perfekta obeanto de la reguloj, kiu tamen permesas al si prijuĝi la alies konduton. Ŝi do kulpigas Jesuon pro la malesto de la fratino.

Sed Jesuo siavice riproĉas Marta. “Sed la Sinjoro respondis: «Marta, Marta...»”, kiam estas la duobligo (rediro) de nomo aŭ de vorto, tio signifas ĉiam riproĉon, kiel kiam Jesuo diras “Jerusalemo, Jeusalemo” kaj li ploris pri Jerusalemo. “«...vi klopodegas kaj agitiĝas pro multaj aferoj, sed nur unu afero estas bezonata»”. Kio estas tiu ununura afero kiu estas bezonata?

Tion diras al ni Jesuo, “«Maria elektis la bonan parton»” – laŭlitere – “«kiu ne estos prenata for de ŝi»”. Kio estas tio kion oni ne povas forpreni de iu persono kaj kial Maria tion elektis? Maria elektis aŭskulti la mesaĝon de Jesuo; kaj jen la frukto de la mesaĝo de Jesuo en kiu ĝin akceptas, estas iu kresĉendo superplena je libero, sed ne temas pri libero kiun oni donas, ĉar la libero kiu estas donita povas ankaŭ esti forprenita, sed iu libero kiu estas frukto de interna konkero.

Ankaŭ je damaĝo - kiel ni vidis en tiu kazo – de alies riproĉo kaj nekomprene. Kiam la libero estas frukto de interna konkero, neniu plu povos ĝin forpreni. Tiu estas la bona parto kiun Jesuo laŭdas en Maria kaj kiun li invitas ĉiujn akcepti.